

VOJAĜINFORMOJ pri Poznano

La sekvaj informoj ne pretendas je kompleteco nek estas nepre validaj por estontaj datoj. Ĉiam rekontrolu antaŭ ol mendi kaj ekvojaĝi. Pliaj informoj kaj korektoj bonvenaj.



Servo de ILEI – verkis SMG: 7an de junio, 2013

Flugoligoj

Poznan havas flughavenon, nur 5 kilometrojn for de la urbocentro, kun bona busligo al la centro. Dek unu flugkompanioj servas ĝin, iuj el ili malaltkostaj – ĉefe Ryanair kaj Wizz. Rektaj flugoj ekzistas el 29 urboj, kun ĉ. 330 internaciaj flugoj semajne kaj 28 enlandaj. Jen kelkaj:



Britio: Bristol (RYNR), Doncaster-Sheffield (WIZZ), East Midlands (RYNR) Edinburgo (RYNR), Liverpool (RYNR), Londono Luton (WIZZ), Londono Stanstead (RYNR).

Bulgario: Burgas (WIZZ)

Danlando: Kopenhago (SAS)

Francio: Paris-Beauvais (WIZZ)

Germanio: Dortmund (WIZZ), Düsseldorf, Frankfurto, Munkeno (ĉiuj LUFT).

Hispanio: Barcelona, Palma de Mallorca (ambaŭ WIZZ)

Irlando: Dublino (RYNR), Cork (WIZZ)

Italio: Milano (Bergamo), (RYNR) Romo (RYNR kaj WIZZ)

Kroatio: Dubrovnik, Zadar (nur unufoje semajne)

Norvegio: Bergen, Oslo (ambaŭ WIZZ)

Pollando: Varsovio (LOT)

Svedio: Stokholmo (WIZZ)

Fervojoj:

Poznano troviĝas sur la ĉeflinio Berlino-Varsovio. La UAM-kursejo kaj tranoktejo troveblas en facila promendistanco de la centra stacidomo. Por vojaĝoj el multaj landoj ekzistas rabatbiletoj se menditaj sufiĉe frue, ekde €29. La vojaĝtempo de Berlino estas ĉ 3 horoj (kaj 2,5 horoj el Varsovio) kun komfortnivelo EC (vidu la bildon) kaj kvar servoj tage. Momente (junio 2013) DB ofertas por iuj el tiuj trajnoj rabatbiletojn je €39, eĉ por samtagaj kaj morgaŭaj vojaĝoj. Por bonprezaj vojaĝoj ene de Pollando, rekomendatas la trajntipo TLK.



Kursdatoj:

Kursoj en UAM: 14-20 sept 2013 (sabate ĝis vendredo). <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

Arkones (kultura festivalo): 20-22 sept.2013 (vendrede-dimanĉe). <http://arkones.org/eo>